


SUBTRANCIA STELO



Bulteno de la Esperanto-Federacio "LANGUEDOC-ROUSSILLON"

Jarabono: 25 F al Fédération d'Espéranto du Languedoc-Roussillon

CCP 956-28 P Montpellier - N° 121 - 2a kvaronjaro 1992

L'Europe, l'Europe... On en parle beaucoup. A Nîmes, ce fut sa fête en Mai. Ailleurs, on se demande comment solutionner le problème linguistique. Beaucoup attendent l'Europe. Les Espérantistes y sont déjà! Ci-dessous quelques-unes des rencontres de cet été. Pour plus de détails, consulter "Heroldo" du 28/3 ou "Esperanto" de Mars (page 48 à 53). Bonnes vacances!

CLUB ESPERANTO

Quelle langue pour l'Europe ?

Les médias nous parlent d'Europe monétaire, d'Europe économique, d'Europe technologique, d'Europe industrielle et d'Europe culturelle, mais d'Europe linguistique, jamais.

L'Europe culturelle sera-t-elle muette ou incompréhensible à la plupart de ses citoyens ?

Le Parlement européen continuera-t-il à pratiquer la traduction dans chacune des langues de la communauté ?

Voici un jeu mathématique amusant : sachant qu'il y a actuellement neuf langues officielles européennes, combien de traductions cela représente-t-il au total ?

(Envoyez vos réponses au club ESPERANTO M.J.C. à Rodez).

Ces questions semblent toujours soigneusement évitées, peut-être pour ménager les susceptibilités nationales. Les Européens de demain parleront-ils, pour communiquer entre eux, français, anglais, allemand, danois, néerlandais, italien, gaélique, portugais, espagnol, grec et qu'advient-il des langues ethniques, catalan, basque, occitan, corse, breton, gallois, gaélique d'Ecosse, frison, bas allemand, etc...

Et si les pays de l'Est adhèrent un jour à la communauté, faudra-t-il apprendre le tchèque, le slovaque, le morave, le polonais, le roumain, le hongrois, le croate, le serbe, l'albanais, etc... Bien sûr, on pourrait

officiellement choisir une langue unique parmi toutes celles qui existent et immédiatement l'anglais vient à l'esprit, mais est-ce vraiment la solution idéale ?

Pourtant, face à cet embroglio, une solution existe : l'esperanto.

L'esperanto est une langue neutre qui peut être un pont entre toutes les autres. Créée depuis plus d'un siècle, elle a acquis suffisamment de vitalité, est parlée à travers le monde entier et connaît actuellement un regain d'intérêt.

De nombreux groupes voient le jour, notamment en Europe.

Le club ESPERANTO se tient à la disposition de chacun pour discuter de ce problème. Nous sommes certains que beaucoup de personnes sont sensibles à ce sujet et aimeraient en débattre.

Les portes du club sont ouvertes chaque mardi soir, lors de nos réunions, et nous nous tenons à la disposition des personnes intéressées pour fournir toutes informations.

Quant aux cours, nous donnons rendez-vous à ceux qui voudraient y participer en septembre, mais d'ores et déjà ils peuvent s'y inscrire. A préciser qu'il s'agit d'un apprentissage de la langue par une méthode directe de conversation adaptée à tous les âges.

Information : M.J.C. Rodez ou M. Legeay, tél. 65.67.10.72.

Esperantaj kongresoj kaj internaciaj renkontiĝoj en 1992



Club UNESCO

"La fête de l'Europe" une réussite !!!

Le samedi 9 mai 1992 s'est déroulée, en la salle Jules Salles à Nîmes, la "Fête de l'Europe" en présence de personnalités nimoises et régionales.

La chorale "l'âge heureux" de Millaud assura l'ouverture avec de talentueuses interprétations.

Le stand "UNESCO", quant à lui, proposa une intéressante réflexion sur le thème : "quelle solution proposer pour qu'une parfaite communication puisse s'établir entre des personnes de langues différentes?" Des invités (2 Allemands, 2 Polonais, 1 Italien et 1 Espagnol) apportèrent des témoignages vivants sur cette intéressante question.

La première conclusion fut de convenir qu'une langue unique est obligatoirement et logiquement nécessaire, oui mais, quelle langue?

Favoriser une langue par rapport à une autre n'est ni normal ni juste.

Il ne serait pas rassurant qu'une langue nationale quelle qu'elle soit prédominât en Europe ou dans le Monde.

Ne serait-il pas préférable d'adopter la proposition du Docteur Zamenhof qui, dès 1887, a offert à l'humanité le moyen de se libérer de la contrainte résultant de la multiplicité des langues, en adoptant la plus simple de toutes pour communiquer avec la plus grande facilité possible, tout en préservant les langues nationales et les langues régionales dans leur pureté et en parfaite équité ? Pour tous renseignements sur les cours gratuits, donnés par le Club Unesco, vous pouvez vous adresser à la Maison de l'Europe de Nîmes, 1 place du château, ou téléphoner au 66 81 14 94.

Federacia kongreso

Nia federacia kongreso okazis la 16an kaj 17an de Majo en la "Centre social des Allocations familiales", kvartalo La Paillade de Montpellier. Louis Ensuque kaj la grupo de Montpellier organizis la kongreson.

Cirkaŭ kvindek ĉeestantoj. Sabate okazis diversaj diskutoj kaj, post la vespermanĝo, distra vespero en kiu partoprenis la grupo de Béziers (teatraĵo) kaj M. Cavelan el Nice (kanzonoj) Dimanĉe, ĝenerala kunveno; bonvenigaj vortoj de Louis Ensuque kaj la prezidanto Jean Hénin. Raporto pri agado kaj debatoj pri diversaj punktoj: vojaĝoj de eksterlandanoj, grupoj de la federacio, organizado de rondvojaĝoj, ktp.

Pri SFS ni decidis plialtigi la jarabonon (30F anstataŭ 25F). Ni gratulas la redaktoron JH kaj André Capus, kiu prizorgas la sendadon.

Nia prezidanto montris kaj legis artikolojn, kiuj aperis en la gazetaro, pri la internacia lingvo. Nia kasistino, S-ino L. Négron, raportis pri la el- kaj enspezoj (SFS n° 120).

Lastjare en Sète ni reordigis la taskojn de la komitatoj (SFS n° 118). Ni konfirmis la taskojn de la diversaj respondeculoj.

La federacio aĉetis la libreton de P. Janton (Puf/Que sais-je? n° 1511) por ĉiu liceo de nia regiono. Disdono ekde Septembro. Ni projektas donaci al ĉiu kolegio du libretojn: BTJ n° 355 "La Barrière des langues" kaj "Le Nouvel Educateur n° 229: le droit à la communication directe par l'espéranto".

La mandato de kvar komitatoj finiĝis: S-ino Authier, F-ino Terral, F-ino Brigitte Hénin kaj S-ro Amouroux. Nur S-ro J. Amouroux ne rekandidatiĝis pro diversaj kialoj; ni dankas lin pro la efika poresperanta laboro en nia federacio. La aliaj estis unuanime reelektitaj. Mankis kandidato por la libera posteno; Jorgos, kvankam ne loĝante en Langvedoko-Rusiljono, estis provizore alelektita.

Louis Ensuque estas nia nova vicprezidanto kaj Jeanine Bony helpsekretario (ambaŭ el la grupo de Montpellier). Jorgos kaj W. Luttermann klopodos pri la venonta federacia kongreso en departemento Aude (Narbonne aŭ Limoux). Louis Ensuque reprezentos la federacion ĉe la Eŭropa kongreso de Verona/Italio.

Ni diskutis la eblecon organizi la nacian kongreson en Sète en 1994. La komitato de UFE decidis en Verona. Bonvolemluloj de la grupoj de Béziers, Montpellier aŭ de la federacio estas bezonotaj por la bona organizado de la kongreso. Ni eklistigis nomojn kaj atendas pliajn.

Ni rendevuis en Sète, okaze de la Internacia Semajno, kiun ĉiam bone organizas F-ino Y. Vierne, la 20an de Septembro, ĉe "Le Lazaret". Je tiu okazo ni vizitos la lokon de la nacia kongreso en 1994.

Post la tagmanĝo, kelkaj inter ni piede vizitis la malnovan parton de Montpellier. Denove ni gratulas la E°-grupon de Montpellier pro la bona organizado de la kongreso.

La sekretario: Charles Gérard-Voinçon.

*
*

Aldonaj notoj:

Ekspozicieto kun paneloj, programo sur komputilo, ktp atendis la eventualajn vizitantojn. Ankaŭ anonco aperis en "Midi Libre".

La rezulto estas preskaŭ nula...

Fotisto de la sama gazeto venis kaj fotis plurfoje. Neniu raporto sekvis...

Gazetistino el "Radio Pays d'Hérault" venis kaj intervjuis plurajn esperantistojn.

Vicurbestro Jacques Martin akceptis Yvette Vierne kaj Louis Ensuque iom antaŭ la kongreso. Li promesis, ke iu urba konsilanto salutos la gekongresanojn antaŭ la ĝenerala kunveno. Neniu venis... Promeso rimas kun forgeso!

Estas dankindaj la geaktoroj de Béziers (ne plu tripo sed kvar- aŭ kvinopo), tiuj, kiuj deĵoris en la librovendejoj Suzanne Capus kaj Jorgos, Michel Cavelan, kiu gitarludis kaj provis kanti, Jeannine Bony + Leo Lentaingne + W. Luttermanno, kiuj trapasigis ekzamenojn (2 aliĝoj sed 6 kandidatoj!), la estro de la kunvenejo kaj ĉiuj, kiuj iel kontribuis.

*
*

Dum la kongreso de Verona UFE oficiale konsentis pri nia invito al Sète en 1994. Ni ankaŭ kontaktos niajn sudkatalunajn geamikojn pri la organizado de "eŭropa kongreso" kiel en Verona. Ĉar baldaŭ aperos ~~aperos~~ libro pri esperanto en la kolekto BT2, ni reekzamenos la aĉeton de libretoj pri E° por kolegioj dum nia aŭtuna kunveno.

Lastminute: la forumo de la asocioj okazos la 13an de Septembro en Montpellier. La tiea grupo kaj la federacio partoprenos. Vizitu la budon!

*
*

Les espérantistes en congrès M-L. 16-05-92

■ Les espérantistes de la région se réunissent en congrès aujourd'hui et demain à Montpellier, 410 avenue de Barcelone, à La Paillade. Cet après midi, à 16 heures, organisée par le centre culturel espéranto de Montpellier qui s'est vu confier l'organisation du congrès a programmé, pour les non-espérantistes, une conférence-débat sur cette langue internationale. Demain, à l'issue de leur assemblée générale, les congressistes visiteront Montpellier.

1ER CONGRES ESPERANTO
DES PAYS EUROPEENS
DU 5 AU 10 JUIN 1992
370 participants
de 22 pays...

UNION FRANÇAISE POUR L'ESPÉRANTO

ASSOCIATION
CULTURELLE
AGRÉE
PAR LE
MINISTÈRE
DE L'ÉDUCATION
NATIONALE
BRANCHE
FRANÇAISE
DE L'ASSOCIATION
UNIVERSELLE
D'ESPÉRANTO
BÉNÉFICIAIRE
DE RELATIONS
DE CONSULTATION
AVEC
L'UNESCO

4 BIS,
RUE DE LA CERISAIE
(ENTRÉE RUE JACQUES-CŒUR)
75004 PARIS

TÉL. : 24 h / 24
(1) 42 78 68 86
Bulletin téléphonique :
(1) 48 87 07 42

C.C.P. : UFE 855 35 D PARIS

Le Congrès Européen d'Espéranto, qui a eu lieu à Vérone (Italie) du 5 au 10 juin 1992, avec la participation de plus de 350 délégués de 22 pays,

considérant qu'à Maastricht les Etats membres de la Communauté Européenne ont pris l'engagement de réaliser avant la fin du siècle l'Union Européenne, et que seul ce cadre institutionnel peut garantir la paix entre les peuples,

alarmé par le résultat du référendum danois,

convaincu qu'une des raisons essentielles de ce résultat a été la peur de perdre son identité dans le cadre d'une intégration politique croissante,

considérant que langue et culture jouent un rôle décisif dans l'identité d'un peuple,

constate que la politique du plurilinguisme, telle qu'elle est actuellement pratiquée dans la Communauté Européenne ne peut atteindre les buts souhaités et conduit en réalité à une inégalité croissante avec la prédominance de fait d'une ou deux langues, et que ceci peut mettre en péril l'harmonie et la stabilité de l'Union Européenne,

conclut que seul l'usage d'une langue planifiée neutre peut conserver la pluralité des cultures européennes et rendre les peuples égaux sur le plan linguistique, en prévenant les effets destructifs d'une langue ethnique glottophage en position d'hégémonie comme l'est aujourd'hui l'anglais, et que l'espéranto est la seule langue qui soit déjà prête à jouer ce rôle,

souligne que le prochain Traité pour une union encore plus forte des pays de la Communauté Européenne doit garantir plus explicitement, par des procédures démocratiques claires, le droit à l'identité culturelle et linguistique,

exige que les instances communautaires et nationales réexaminent le problème des langues en prenant en compte les propositions du document "La Communication dans la Communauté Européenne" du Centre Européen d'Espéranto, et qu'en priorité, ils appuient l'expérimentation à grande échelle, sur la valeur éducative de l'espéranto, notamment comme préparation à l'étude des langues, et que les dispositions ultérieures concernant LINGUA et d'autres programmes semblables incluent l'étude d'une langue planifiée.

REZOLUCIO n° 2 :

La Eùropa Esperanto-kongreso okazinta en Verona (Italio) de la 5a ĝis la 10a de Junio 92 kun pli ol 350 partoprenintoj el 22 landoj,


konscia pri tio, ke la eblecoj de grandskala disvastiĝo de la internacia lingvo Esperanto je Eùropa kaj je monda niveloj estas intime ligitaj kun la entrepreno konstrui unuigitan Eùropon,

emfazas la gravecon de la agado, kiun faras Eùropa Esperanto-Unio pere de la Eùropa Esperanto-Centro, precipe per prezentado de la projekto "Komunikado en la Eùropa Komunumo",


invitas ĉiujn landajn asociojn en la Eùropa Komunumo kunlabori en tiu agado laŭ kunordigita maniero en la kadro de EEU,

invitas la landajn asociojn kune okazigi pluajn eùropajn esperanto-kongresojn en 2-3 jara ritmo kaj regulajn konferencojn de respondeculoj de la asocioj cele al pli kaj pli strikta kunlaboro,

notas la agadon de la transnacia Transpartio Radikala favore al Esperanto kaj gratulas pri ĝi, invitante la landajn asociojn kaj la unuopajn esperantistojn pli oportune atenti kaj utiligi la eblecojn, kiujn tiu agado malfermas.



VERONA



Internacia kongreso ne estas nur afero de oficialaj kunvenoj, tedaj raporto kaj rezolucioj. Jen alia maniero ĝin ĝui aŭ ĝui flanke de ĝi...

PROMENADO

TRA VERONO

kaj ĉirkaŭaĵoj:::

Preteriru la riveregon Adige kaj ĝiajn kotajn akvojn de la printempo, de la centro Mons. Carraro, kie okazas la kongreso, ĝis la ruĝa brik-ponto de Scalinger-fama familio, kiu regis la regionon dum la 13a kaj 14a jarcentoj.

Ni jam promenas en la mezepoka kvartalo : la ponto enirigas nin en la fortikan kastelon "Castelvecchio".

Sekvu nin laŭ la vojetoj, vi povas levi la kapon : estas ĉiam iu florita balkono... iu fenestro, kiun skulptaĵoj ĉirkaŭas aŭ ferforĝita krado defendas... iuj freskoj sur okraj muroj... iuj kamenoj, kiuj similas dometojn...

Jen la romiaj arenoj, kiuj rondiĝas sur la placo Brà, kaj en kiuj oni starigas dekoraciojn por venonta lirika spektaklo.

Jen la kolora bazaro de placo de la herboj, la brika turo de familio Lambertti, de kies pinto ni ĝuu la panoramon super la regionon, ĝis la Alpoj, kondiĉe ke la suno brilas.

Jen la delikataj arkoj de renesanca palaco kaj ĉiam preĝejetoj kun malnovaj mozaikoj sur iliaj plankoj... preĝejetoj kun kupoloj, aŭ kvadrataj kampaniloj, aŭ bronzkovritaj pordegoj...

Ne forgesu admiri la statuon kaj balkonon de Julieta, vi eĉ povas eniri... por vidi... nenion. Vi ne vizitos tiun de Romeo : ĝi estas privata.

Priverŝu la tombejon de la eternaj geamantoj; se vi volas, geedziĝu en apuda salono.

Nun ni estas lacaj : sidiĝu por gustumi pastojn? -ne, dankon : tiuj certe tre bonaj sed oftaj, manĝitaj kaj manĝotaj, en la centro, sufiĉas -ni proponas mirindajn glaciaĵojn...

Hodiaŭ, radŝipo atendas la kongresanojn sur la Garda Lago; ĉarmaj urbetoj : Peschiera, Sirmione estas la du unuaj etapoj de mini-krozado; preterveturinte parton de suda kaj okcidenta bordoj, ni revenas, nokte, ĝuante nian vespermanĝon sur la ŝipo.

La lasta vizito proponita de la kongres-teamo estas vizito de Mantuo; antaŭ la duka palaco de la Gonzaga familio atendas afablaj esperantistoj de la urba grupo; dank'al ili ni vizitos kelkajn el la multnombraj ĉambroj de la palaco, kun belaj kason-plafonoj; restis iom da tempo por atingi alian placon de la herboj.

...Certe la suno ne tro brilas... Certe diapozitivoj estas parte fuŝitaj... Sed tio mem estas plia kaŭzo por inviti al reveno, por admiri ekzemple la ĉefverkojn de Mantegna, kiuj akceptas la vizitantojn en diversaj lokoj de Verono kaj finfine en tiu palac-ĉambro de Mantuo : la ĉambro de la Geedzoj. Kaj ĉu ne estas bona fin-punkto post kongreso en la urbo de Julieta kaj Romeo?

J. B.

La aŭtoro prezentos nefuŝitajn diapozitivojn pri Verona en Montpellier la 2a de Decembro

POEMO : Verono, Vieno

 Freneza urb' de geamantoj,
 Freneza urbo de l' plezur',
 Ce vi freneze sonos kantoj
 Esperaj sub brila lazur'.

^
 Ci frenezuloj de l' espero
 Pri mondo sen malamoprem'
 Forpelu el freneza tero
 Frenezajon de miskompren'.

Simone BONIOL

Béziers

Nun venas somero kaj feriado. Ne estos kunvenoj en Julio kaj Aŭgusto. La venonta renkontiĝo okazos la 26an de Septembro je 14h30, ejo nekonata ĝis nun! Tiu informo aperos en la loka gazeto. En tiu kunveno ni decidis pri la diversaj kursoj, kiuj komenciĝos verŝajne meze de Oktobro. Do la (jam) lernantoj kaj ankaŭ la aliaj grupanoj informu, varbu novulojn kaj venu kun ili je tiu okazo.

La sekvanta kunveno okazos la 10an de oktobro; la dato de la aliaj aperos en SFS de Oktobro.

S T A Ĝ O : la staĝo en Agde disvolviĝis fine de Majo kun 25 partoprenintoj.

Do, iom pli ol lastjare. Pluraj venis de tre malproksime : Bordeaux, Le Mans, La Rochelle, Metz, eĉ Nouméa. Komprenoble, tiuj lastaj staĝanoj estis en Francio jam de tri monatoj, tamen ili kaptis la okazon partopreni staĝon! Kun afableco ili prezentis lumbildojn kaj prelegeton pri sia lando (geografio, faŭno, flaŭro). Ni devas danki ne nur ilin, sed ankaŭ radioamatorojn, kiuj prezentis sian kromokupon. Aparte mi menciis la senĉesan sindonemon de J-P. Peray, kiu aranĝis la teatron vesperon, mem konstruis la dekoron, kaj ankaŭ aktorin...

Dankojn al S-ino Bernard kaj S-ro Boumal, kompetentaj gvidintoj de la kursoj, kaj al ĉiuj staĝanoj, kiuj per sia afableco kaj bonhumoro helpis krei agrablan etoson.

La familia domo Batipaume estas vere taŭga loko por staĝo : komfortaj dormoĉambroj, klasĉambroj, silento, agrabla parko kaj afablaj prizorgantoj. Nur la suno mankis....

S.A.

Gratulojn al la organizintoj, kiuj senlace aranĝas tiun rendezuon, ĉiujare je Cielirado. Ni ankaŭ aparte ĝojas pri la resaniĝo de nia amiko C. Boumal.

P I K N I K O : La suno ne mankis en Caŭduro dimanĉon la 21a de Junio.

Tamen la temperaturo restis malalta. Dekduo da personoj partoprenis kaj komune tagmanĝis en "Mondhejmo", kiu ĉiujare plibeliĝas. Dankon al A. Sanz, kiu kiel kutime afable akceptis ĉiujn.

M O N D H E J M O : Ekologia Centro internacia

El la lasta informilo :

"Dank'al grava pruntedono de MH-membro, kiu ricevis heredaĵon kaj la saldon de longjara ŝparkontrakto, ni povis fini la unuan etaĝon, konstrui la subtegmentojn, meti la tegmenton kaj ĉiujn pordojn kaj fenestrojn (MH havas 3 pordojn kaj 11 fenestrojn), kaj fini ĉiujn pezajn masonajn laborojn. La fino de la tunelo estas jam proksima, tamen restas ankoraŭ protekto kaj plibeligo de muroj kaj vandoj".

Ne estas malpermesite helpi MH. Aligo kostas 300F, poste sufiĉas jara kotizo de 50F. Por pliaj informoj : Mondhejmo - Caŭduro 34360 St Chinian

Tel: 67 97 26 63.

La jara kunveno de Mondhejmo okazos dimanĉon, la 13an de Septembro

Montpellier

La kunvenoj de la 1a de Aprilo kaj de la 6a de Majo estis dediĉitaj al preparado kaj organizado de la regiona kongreso.

Dum la junia kunveno, Yvette Vierne lanĉis debaton pri du temoj:

- elekto de ŝia dua telefonnumero hejma por propagandi por E^o en telefonlibroj. Rapide k. unuanime aprobita.

- asekuro dum kunvenoj kaj internaciaj E^o-semajnoj: longega babilado, ĉar ambaŭ solvoj havas avantaĝojn kaj malavantaĝojn. la solvo: la montpelliera grupo asekurigas sin mem sed konsekvence la aliĝkotoj plialtiĝas je almenaŭ 15F. 2a solvo: la loka grupo uzas UFE-an asekuron sed tiam la grupo perdas sian sendependecon de ĉiu ajn asocio, kaj kelkaj anoj tion ne ŝatos. Plie, necesas ŝanĝi la statutojn. Finfine decido: la venonta oktobra loka kunveno estos dediĉata al tiu nura temo.

Venontaj kunvenoj: la 7an de Oktobro : vidu ĉi-supre

la 4an de Novembro : L. Ensuque montros lumbildojn pri Egiptio

la 2an de Decembro : J. Bony prezentos la urbon Verona en Italio.

Langue "Midi Libre" 30-06-92

Dans le traité de Maastricht, nos technocrates ont prévu de promouvoir la connaissance des langues étrangères, à la demande. Mais cette liberté, en fait, ne profitera qu'aux langues portées par leur puissance économique, actuellement surtout l'anglo-américain. Imaginons que l'anglais devienne la langue commune. Alors, tout citoyen européen devra apprendre, outre sa propre langue, l'anglais. A l'exception des Anglais qui, eux, auront le choix. Pourquoi cet injuste privilège ?

La protection des langues minoritaires exige une limitation de cette liberté. Seule solution acceptable : une langue neutre. Quelle autorité, au nom du bon sens et de la justice, provoquera une "Nuit du 4 août" pour supprimer les privilèges linguistiques ?

L'apprentissage de cette langue permettrait à chaque citoyen de participer activement, personnellement, à la construction de l'Europe nouvelle.

Armand DIEZ (Montpellier)

Nîmes

Vi legis sur la fronta paĝo raporton de la "Gazette village/Fédération des Foyers ruraux du Gard" pri la "Festo de Eŭropo" en Nîmes. Jen pli detala raporto.:

La 9an de Majo okazis en Nîmes la festo de Eŭropo. La tiel nomata "Domo de Eŭropo" petis de la E°-Unesko klubo ĝian partoprenon jam en Februaro. 30 asocioj partoprenis en la festo, inter kiuj la "Domo de junuloj" de Arles, la "Amikoj de E°" de Uzès kaj la esperanta "Klubo Unesko" de Nîmes.

Ni, la 3 asocioj pri E° dispartigis la laboron: Arles okupiĝis pri prezentado de la lingvo kaj ĝia utileco, Uzès pri ludoj por gejunuloj kaj pri la lanĉo de la vorto E° tra la urbo, tiel la klubo de Uzès alkroĉis grandajn panelojn kontraŭ la kradoj de la romiaj monumentoj, sur kiuj paneloj estis skribitaj frazetoj. La ludantoj devis alporti la tradukon de tiuj frazetoj al la stando aŭ peti helpon.

La E°-Unesko-klubo disdonis foliojn pri sondado laŭ la peto de la agad-grupo poresperanta de St Yrieix. La lasta parto de tiu ludo konsistis en la serĉado de Esperantistoj, kiuj surmetis E°-etiketon. Bileto de senpaga loterio estis disdonita al ĉiuj partoprenantoj en la diversaj ludoj kaj en la sondado.

Ni disdonis 400 biletojn, do proksimume 300 personoj venis al la stando kaj tie la deĵorantoj varbis por E°, disdonante la "unuan rendezuon" aŭ alian reklamfolion. Ĉio okazis en tre bona kaj gaja etoso. La stando estis ĉiam plenplena.

Matene, je la 10a h. la festo estis malfermita de la ĥoro "l'âge heureux" de Millaud, kiu kantis la eŭropan himnon en E° antaŭ la aŭtoritatuloj; emociega momento por esperantisto, ĉar la paroloj de la himno estis aranĝitaj de Valo kaj la interpreto estis belega. Valo, bedaŭrinde, ne povis ĉeesti la feston sed ni registris la kanton por sendi al li.

Laŭ la peto de multaj esperantistoj, ni proponas tiun sonbendon kun la registrado de la 5 prelegoj ĉe France Culture al la personoj, kiuj deziras posedi ĝin. Bonvolu kontakti 66-81-14-94.

Aldonendas, ke FR3 donis tre kompletan raporton en sia elsendo de la 19a horo. La vorto E° krevis la ekranon plurfoje. Ni estis bone helpitaj de la animanto de la festo (lia patro estis esperantisto en Heyrez: Sro Agussol, en 1920). La helpo venis ankaŭ de la tuta E°-grupo sen escepto, kiu penis multe por la sukceso de tiu festo.

Mi aldonas: ĉu la sukceso de tiu tago daŭros? ĉu ne estas guteto en la maro, kiu guteto perdiĝos? Mi ne scias, sed mi legis iafoste: "konstante frapanta guteto traboras eĉ ŝtonan graniton". 400 personoj respondis: "Jes, Zamenhof pravis proponi neŭtralan lingvon, ni estas pretaj diri: ni volas neŭtralan lingvon kiel komunan lingvon, ni proponas Esperanton". Jam ni ricevis plurajn rendezuojn kaj proponon de provo en la lernejo de Vauvert laŭ la "projet pédagogique d'innovation" ekde Oktobro.

Alia tre interesa propono estis prezentita de Sro Perreau de Uzès; li estas lingvisto kaj proponas helpi S-inon Gausson en la kursoj de Nîmes kaj Uzès. S-inoj Coulomb, Soulier kaj Boutin ankaŭ proponas helpon por kursoj.

A.G.

Gratulojn al ĉiuj partoprenintoj! Fojon plian estas la demonstracio, ke plurope Esperantistoj kapablas ion atingi.

Eble ekde Oktobro ĉiusemajna kurso aperos en la ĉiusemajna gazeto "Regards".

En Aŭgusto "Nimbuso" ruliĝos al Hispanio kaj la ekspozicio de Sevilla. La Federacio helpos junulinon partopreni. Alia priesperanta informo estas atendata kaj esperata.

Opini-sondo en departemento Gard:

SFS aludis lastfoje al tiu sondo pri Eŭropa lingvo. La sondinto, Sro Ferrières, kiu nun loĝas en Martigues, skribis al urbdomoj, lernejoj, inform-medioj...

El la 300 kontaktitaj urbdomoj de Gard venis 9 negativaj respondoj kaj 6 pozitivaj.

El la liceoj kaj kolegioj de Gard venis du negativaj respondoj. El la aliaj departementoj, neniu respondo el la kontaktitaj 90 liceoj/kolegioj kaj 3 negativaj el la 90 urboj-prefek-tejoj... Koncerne la mediojn, nerespondo aŭ propono de prokrasto... Konklude, la decido pri elekto de lingvo por la Eŭropanoj ne pasiigas. Akordo pri tiu temo ne estas videbla!

Interland: (devizo: liberigas vin el ĉia landlimo kaj lingva barilo)

Ĝi daŭre funkcias laŭ la aga bilanco sendita al SFS. Nuna adreso: 25, Bd Jules Sandeau 75116 Paris Tel: (1)45 03 10 03. Ĝenerala kunveno okazis la 27an de Junio. La financa bilanco kaj rezult-konto sendiĝos senpage al ĉiu akciulo, kiu petos ilin.

"Interland" bedaŭras la malfavoran impreson pri Esperanto sur la publiko kaj pro tio promocias la uzon de "la moderna latina lingvo" (Interlingua)...

Aliloke en tiu raporto Interland invitas la E°-asociojn montri al la medioj kaj la publiko, ke ili ne estas tiom fanatikaj, sektemaj, obseditaj de sia mirakla instrumento (mi citas)... kiom ili ofte donas la impreson... Prave, ne per paroladoj oni konvinkos dubantojn sed per praktikaj agoj. Tamen, ni, Esperantistoj, scias, ke nia lingvo funkcias kaj tio ne estas sektismo.

Perpignan

Hommage au Majoral du Félibrige 86 ans, 71 ans de vie associative

(artikolo aperinta kun foto en "L'indépendant"
dela 6a de Aprilo 1992)

Gratulojn al nia sindonema veterano !
Per molts anys ! Por multaj jaroj!

Récemment, au C.D.A.C.C., et sous l'égide de l'Association polytechnique des P.-O., un hommage fut rendu par les huit sociétés dont il assure la permanence, au 72, avenue du Général-de-Gaulle, à Perpignan, à M. René LLech-Walter, majoral du Félibrige.

M. René Benazet en espéranto, Mlle Alice Marcet en catalan, Mme Christine Vicens-Payre et M. Albert Léophonte, ont parlé

de 71 ans au service des cultures françaises et catalanes. Ponet et Anita Jorda, la Rondale et Albert Tusell des Troubadours catalans, mirent en valeur les chansons du Majoral Llech-Walter.

Ce fut une fin d'après-midi amicale et fraternelle qui se termina par un "Per molts anys" suivi d'un apéritif catalan servi par M. et Mme Noguer.

Rodez-La Canourgue

Vi legis sur la frontpaĝo eltiraĵon de "Centre Presse"(26/4) pri la lingva problemo en Eŭropo.

Pluraj esperantistoj partoprenis la Sat-Amikaran kongreson apud Bordojo (preskaŭ 400 aliĝintoj).Ci-malsupre la komenco de longa artikolo en "Sud-Ouest" kaj la konkludo.

Têtus, les espérantistes le sont et ils le démontrent quotidiennement. Mais ça ne les dérange pas. Ils sont convaincus que l'idée qu'ils défendent depuis des années est la meilleure.

« L'anglais, langue internationale ? Vous voulez rire ! », disent-ils. Ils n'ont pas tout à fait tort. 92 %

des habitants du globe sont non-anglophones. Et pour ne rester qu'en Europe, des statistiques effectuées récemment prouvent que 6 % seulement des habitants des douze pays de la CEE sont capables de s'exprimer en anglais parfaitement et dans tous les domaines qui soient. Un dur constat à la veille de l'abaissement des frontières...

Les défenseurs de l'Espéranto ne passeront donc plus directement par les élus pour obtenir satisfaction. Ils joueront sur la masse. Plus il y aura d'espérantistes en France, plus ceux-ci pèseront lourd dans la balance, et plus ceux-ci seront pris en considération.

Dum la somero vizitos nin Rumana paro kaj poste Bulgaro (pri tiu lasta, emerita instruisto pri la franca lingvo, kontakti B. Legeay, se la vizito de la bulgara samideano interesas vin). En oktobro ni eble gastigos S-inon Tatjana Bockova el Moskvo (prelegvojaĝo de UFE); la oficiala temo de la prelego estas tre serioza: "medioprotekto de transporta bruoj", ktp sed Tatjana ankaŭ kunportos lumbildojn pri Moskvo.

Ariège

La ĝenerala kunsido de CEEA okazos en Verniolle la 12an de Septembro (urbdomo, je la 14a h.) En Julio eble kunbiciklos gejunuloj. Antaŭ nelonge renkontiĝis 15 infanoj.

Printempo de la junuloj en Arjeĝo: kvindeko da personoj ĉeestis prelegetaron.

S-ino Couret paroladis entuziasme pri la graveco de la grekaj kulturo kaj lingvo, Janus (Itala latinisto) konsciigis pri la ĉieaj spuroj de la latina en lingvoj etnaj kaj helpaj, Sro Carbone prelegis pri la Okcitan literaturo kaj poste J. Taupiac emfazis la gravecon de E° pro propra okcitanismo. Profesoro Duc-Goninaz klarigis pri Homaj Rajtoj en komunikado kaj Sro Delpla pri urĝeco ekkoni la okcitanan lingvon por komerci kun najbaraj Katalunoj, kiujn plej interesas nek la kastilia nek la angla lingvoj sed unue la propra kaj due la kuza okcitan lingvo

Toulouse

Nun funkcias kultura E°-centro en Toulouse. Ni atendas detalojn Ne mankas planoj ĉe Eurokka, jen kelkaj el ili...

1. Plifirmigo de la Rokmuzika Reto por pli efikaj interŝanĝoj kaj por pli bone organizi la distribuadon de Vinilkosmo kaj Rok-Gazet' en ĉiuj kontinentoj.
2. Ampleksigo de turneoj de esperanto-rokgrupoj, komence en la eŭropa reto, kun pli aktiva kunlaboro kun la junularaj esperanto-asocioj, tiel ebligante la starigon de turneoj en almenaŭ la gravaj eŭropaj urboj. Ekzemple, okaze de la veno de esperanto-muzikgrupoj de aliaj kontinentoj por surbendigi en Pigstudio en Stokholmo.
3. Varbado ĉe naciaj neesperanto-rokasocioj, rok-gazetaro, ktp., pere de perantoj en la Rokmuzika Reto aŭ en junularaj esperanto-asocioj de ĉiuj landoj.
4. Pli oftaj klopodoj por helpo en la esperantigo de kantoj de neesperanto-muzikgrupoj por ke aperu novaj papagaj esperanto-rokbandoj pli-malpli famaj.
5. Instigo je novaj esperanto-rokbandoj.
6. Starigo de efika stabo de homoj kapablaj traduki kaj verki tekstojn en perfekta esperanto, kaj adapti ilin (metrike kaj ritme) kun la muzikoj de tiuj grupoj. Interesuloj povas proponi sin.
7. Instigo je pli alta kvalito, muzike kaj tekste, de la esperanto-rokbandoj.
8. Helpo al esperanto-muzikgrupoj por produkti novajn kasedojn kaj diskojn.
9. Kunlaborado kun Pigstudio por produktado de tiuj esperanto-muzikgrupoj tra Vinilkosmo por plidiversigi kaj pli altigi la kvaliton de la esperanto-muzikproduktaĵoj.

LA FREŜA
ĈI-JARA
ELDONO
DE

Modele bele presite kaj plene kontrolite
laŭ aktualeco de ĉiuj adresoj, ĵus aperis

PASPORTA SERVO



Havigu al vi ĉiun bazan adresaron de TEJO, por via propra profito, sed ankaŭ por kunsubteni ĉiun nian komunan servon. La listo haveblas ĉe la libroservo de LEA kontraŭ 18 .NLG plus sendokostoj, sed ni rekomendas unue demandi ĉe via landa sekcio de TEJO: ĝi avertuale povas oferti al vi eĉ pli favoran prezon!

ĉe Jefe: 45F perpoŝte: 50F/ne-membroj 5F

Provence

Nova konsilantaro de la Vaŭkluzo Federacio elektita en Marto:

Prezidantino: J. Couderc; sekretariino: M. Hunninc; Vic-sek: J. Collet; Kasisto: M. Langlois; vic-kasisto: Y. Collet. Adreso: Centre culturel E° La Charité-BP 136-84024 Carpentras Cedex.


La printempa pikniko okazis en Isle sur la Sorgue en Majo

La 9a Rodana rendezuo okazos en Carpentras la 17an kaj 18an de Oktobro en "Logis des Jeunes du Comtat" (3 kaj 4 litaj ĉambroj)

Kotizo: 110F (paro: 200F, junulo: 80F) Tuta restado en "logis": 160F 1 vesper- aŭ tag-manĝo: 60F.

Aliĝon al: Groupe espérantiste/Centre culturel La Charité BP 113 84204 Carpentras Cedex
Plurgradaj kursoj; distra vespero kun Nikolino.

Staĝo pri Akvarelo: dulingva kun J-P. Cavelan en Guillaumes (06) de la 16a ĝis la 29a de Aŭgusto
Kontaktadreso " " 164, Chemin de Saquier 06200 Nice (Tel. 93298225)



LIBROJ

Un livre qui arrive à point

Les problèmes de communication linguistique prennent des dimensions préoccupantes. L'auteur de cet ouvrage aborde des questions de plus en plus fréquemment traitées par les médias, mais il le fait avec un regard hors du commun basé sur une connaissance réelle des faits et situations, sur le vécu. Après avoir été traducteur polyvalent à l'ONU et à l'OMS pour l'anglais, l'espagnol, le chinois et le russe, Claude Piron s'est tourné vers la psychologie. Il enseigne à la Faculté des Sciences de l'Éducation de l'Université de Genève.

Ce livre comporte deux études. Dans la première - "De quel droit nous prive-t-on de la solution optimale?" - l'auteur compare les divers systèmes appliqués et d'autres systèmes possibles. La seconde s'intitule "Un cas étonnant de masochisme social". Elle est déjà parue dans un numéro (maintenant épuisé) de la revue "Action et Pensée" de l'Institut de Psychanalyse Charles Baudoin. Le tout tient en 56 pages et comporte de nombreuses et solides références. C'est un ouvrage dont la lecture exige peu de temps. Il apporte bien des éléments de réflexion. Il est disponible au Service Librairie de SAT-Amikaro.

+30F

Esperanto en Universitatoj kaj superaj institutoj:

Skizo pri la situacio en 91-92 : Prezo: 60BF + sendkostoj 30BF al pĉk 000-0259390-12

G. Pirlot -B-8400 Oostende Steenbakkersstr.21

Eblas pagi per bankbiletoj

La ronkanta avo: (eldonaĵo de la orientfranca federacio (25F/inter 3 kaj 10 ekz.: 16F + sendk.))

Avo Klazen retrovas vivenerĝion dank'al brua aro da infanoj, kiuj postulas vivindan vivon en griza industri-urbo. Bele ilustrita. Taŭgas por staĝo aŭ konversacia kurso.

Avo-fungo: (ankaŭ orientfranca fed.). 8 originalaj rakontoj de J-L. Claudel.

Malicaj buboj petolas tra la voĝeja kamaparo, dum la pliaĝuloj foje ŝerce, foje malĝoje vivas sian vivon en epoko, kiam la modernismo ankoraŭ ne tre modernis! Spriteco kaj nostalgio.

30F (pli ol 3): 20F (pli ol 10): 17F + sendkostoj/Libroservo 12, Rue E. d'Orves 54490 Piennes

QUI FAIT QUOI WHO DOES WHAT
KIU FARAS KION KIO FAĜAS KIO
WER MACHT WAS

RÉPERTOIRE DES PRODUITS INDUSTRIELS DE LA MEUSE
THE INDEX OF INDUSTRIAL PRODUCTS OF MEUSE
DAS VERZEICHNIS DER INDUSTRIEPRODUKTE DER MEUSE
INDEKSO DE LA MOZAJ INDUSTRIAJ PRODUKTAĴOJ

NUMÉRO SPÉCIAL DE MEUSE ÉCONOMIQUE
LE MAGAZINE ÉCONOMIQUE DE LA CHAMBRE DE COMMERCE ET D'INDUSTRIE DE LA MEUSE
N°125 - Février 1992 - 40 F

SOMMAIRE
BIEN INFORMÉ POUR DÉCIDER
 SUIVEZ LE GUIDE... EN MEUSE

INHALT
